

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA  
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO: 6 SV. FR. AU 1'50 USONAJ DOLAROJ AU EGALVALORO EFEKTIVIGEBLA EN BARCELONA

---

**Redaktoroj: S. Alberich-Jofrè, Delfí Dalmau, Jaume Herp**

---

## Justificació de l'Esperanto

A mesura que el temps va assenyalant nous progressos del pensament de l'home, es fa més evident la necessitat d'un mitjà de comunicació verbal que doni als humans la facilitat d'entendre's reciprocament, sense minvar cap dret que, el renunciar-hi, constitueix una humiliació i a l'ensem representa la força del fort damunt del feble.

Tots els pobles tenen el mateix dret de respecte i tots els pobles tenen l'obligació de respectar la parla dels altres, i mentre no sigui acomplert aquest principi natural romandrem en un estat neguitós que com a conseqüència immediata portarà el reviscolament d'odis i menyspreus.

Es en aquest aspecte que l'esperanto té una importància molt gran: davant les imposicions lingüístiques que el vencedor vol fer acceptar al vençut, l'esperanto ha d'ésser el mitjà conciliador que sense ferir cap sentiment pugui ésser usat en les relacions dels que naturalment tenen una parla diferent.

No volem dir pas en fer aquestes manifestacions que sempre hàgim de patir les maleïdes guerres, no, però el fet que arreu del món es manifesti cada dia més amenaçadora la diferència de parles, ens autoritza a assenyalat el perill i també a indicar el mitjà d'una solució justa, sense caure en cap abjecció ni vilipendi.

Tots els que lluitem pel triomf de l'esperanto tenim el convenciment que defensem un ideal noble, que tots els esforços que hi esmercem s'ajunten amb tots aquells altres que tants d'homos de tots els països, per diferents viaranys però amb el mateix fi, treballen per atènyer una humanitat més justa, més racional, més enlairada.

# L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó), p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

*L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)*

## LA

artícle determinatiu

el, els  
la, les

## J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj  
okuloj, animoj

## IN

sufix per al

femení

heroino, reĝino  
katino, leonino

## O

terminació  
substantiu

lakto  
urbo  
komerco  
(comerc)

## A

terminació  
adjectiu

blanka  
antikva  
komerca  
(comercial)

## I

terminació verb  
(infinitiu)

kompreni  
labori  
komerci  
(comerciar)

## E

terminació  
adverbial

klare  
konstante  
komerce  
(comercialment)

## CONJUGACIÓ DEL VERB

### AS

temps present

Mi skribas  
Jo escrib

### IS

temps passat

skribis  
escrivi

### OS

temps futur

skribos  
escriuró

### US

mode condicional

skribus  
escriuria

### U

mode imperatiu o subjunctiu

skribu  
escriĝu

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

## DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

*Li vidas min.* Ell em veu.  
*Mi vidas lin.* Jo el veig.

*Mi skribas la leteron.* Jo escrib la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

*Al la patro, per la plumo, sur la tablo*



# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ  
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro*      Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

## Pri nia Kongreso

Santa Coloma de Farnés post malmultaj semajnoj — 23-25 majo — akceptos la batalantojn de la paca idealo okaze de la XIII Kongreso de nia Federacio kaj XII Internaciaj Floraj Ludoj. Santa Coloma, ĉarma urbeto, ne havas multajn esperantistojn sed feliĉe ilia fervoro kompensas kontentige la mankon de la nombro.

La katalunaj esperantistoj nepre devas atenti la proksimiĝon de niaj Festoj kaj ne forgesi alvojaĝi la kongreslokon ĝustatempe. La entuziasmo de niaj federacianoj kaj ceteraj samideanoj partoprenontaj la Festojn certe sukcesos akceli la progreson de Esperanto en Santa Coloma kaj apudaj vilaĝoj.

Oni pripensu, ke apud la flankoj amuza, instrua, organiza de niaj Kongresoj ni havas tiun gravan de la propagando. Al tiu ĉi aspekto oni turnu la rigardon kaj vidu kiel belan okazon donas ĉiu kongreso por diskonigi la celon kaj tutmondan disvolviĝadon de nia movado. Ne nur al amikaj rondoj ni povas turni nin tiuokaze, sed ankaŭ pere de la gazetaro al la tuta publiko. La fakto ke 140 verkoj venis por la Floraj Ludoj, valoras pli ol multaj argumentoj: ĝi nerefuteble pravas, ke la internacia lingvo vivas, progresas, konstante iras sian vojon.

Ni alvokas ĉiujn samideanojn al la batalo. Ĉiuj gazetoj kaj ĵurnaloj parolu pri la veraj sukcesoj de Esperanto okaze de nia baldaŭa Kongreso. Ni ja ne bezonas la falsajn argumentojn de iu fuŝisto, kiu en nia lando ekpredikas la ŝajnan superecon de iu mortinta reformajo.

**Samideanoj, starigu por la batalo!!!**

## Pri Kataluna Antologio

Mi ĵus legis sur flugfolio pri la irlanda lingvo, tiujn profundajn pensojn, «Nacioj, simile al homoj, havas korpojn kaj animojn, kaj en ambaŭ, la animo estas la altvalora, senegala parto. Kiam ili apartiĝas, la korpo de la individuo pereas. Sed kontraŭe, kiam la korpo kaj animo de nacio disiĝas nerevokeble, estas la animo kiu mortas – La vivo de la morta parto de homo, nome de la korpo, centriĝas en la koro, kaj kiam la koro ĉesas pulsadi, la surtera laboro de la homo finiĝas kaj li estas mortinta. La animo de nacio, kiu estas la pereebla parto de ĝia komplikita strukturo, troviĝas en ĝia lingvo, kaj kiam la lingvo malaperas, tiu nacio estas mortinta».

La mezo de la 19.<sup>a</sup> jarcento estis rimarkinda pro la reviviĝo de nacioj ŝajne malfortaj kaj eĉ mortontaj. Nun ili staras kuu renovigita forto, pro la sindonemo kaj naciismo de siaj poetoj kaj verkistoj. Inter ili troviĝas Katalunujo.

Usona verkisto, Ralph W. Emerson, diris, «Ligu vian veturilon al stelo». Sola inter la «malgrandaj nacioj», Katalunujo tion faris, ligante sian nacian lingvon al la nove aperinta stelo, Esperanto. Nun per Esperanto, la cetera mondo havas la okazon konatiĝi kun la literaturo, antikva kaj moderna, de katalunaj verkistoj.

Laŭ mia opinio, Kataluna Antologio estas la plej grava Esperanta libro ĝis nun eldonita; ĉar ĝi malfermas vojon al la kulturo de fremda lando. La enhavo estas miriga, la arango bonega, la lingvaĵo simpla kaj facila sed esprimplena kaj fundamenta. Speciale laŭdindaj estas la skizo pri kataluna lingvo, la biografiaj notoj, kaj la bonstilo de la diversaj tradukaĵoj. La Antologio estas bela florbedo en la Esperanta ĝardeno.

Inter tiom da belajoj estas preskaŭ neeble distingi, sed el la poemoj multe plaĉis al mi, «Plaĉa Marbordo», kies ritmo rememorigis al mi la ondiritmon de la maro, «Granda Arbo» veroplena bildo, kaj «Popola», ĉarma balado.

La antikva poemo «Desert d'Amics», de Sant Jordi, similas al malnova irlanda poemo, «Slán le Maig». El similaj suferoj naskiĝas similaj sentoj. El la rakontoj, kiujn mi elektos inter tia riĉamaso?

«La Studento» de Rossinjol estas ja kortuŝanta, sed certe, «Anstataŭiĝo» kaj «Rezignacio» estas geniaj verkoj, tiel simpatie verkitaj kaj tradukitaj, ke oni povas vidi la geaktorojn kvazaŭ sur kinema filmo.

Konstatinte ke la du lastnomataj estas verkoj de virino, mi estis tre kontenta, ĉar unuavide mi pensis, ke nur viraj nomoj estis en tiu granda aro. Oni tamen ne povas imagi, ke nacio povus sukcese barakti por sia antaŭeniro se virinoj ne partoprenis. La poetoj kaj prozistoj sendube ricevis impreson kaj instigon de siaj patrinoj sed estas malfacile por virinoj mem preni la plumon kaj esprimi la pensojn; ili devas mastrumadi, zorgi infanojn, plenumi la sennombrajn taskojn ĉiutage alvenantajn, kaj samtempe fortigi la animojn de la edzoj kaj filoj. Ju pli do, mi ĝojis vidante nomojn de du virinoj en ĉi tiu rimarkinda verko.

Fine, ĉi tiu pionira libro montras ne nur la entuziasmon, sed la persistemon kaj paciencon de niaj katalunaj samideanoj, kaj precipe de Sro. Jaime Graŭ, kaj mi esperas ke ĝi instigos la aliajn «malgrandajn naciojn» al simila laŭdinda agado.

EMMA L. OSMOND.

---

La Redakcio neniel respondas (sed nur la aŭtoroj aŭ tradukintoj) pri opinioj, neologismoj, kaj aliaj detaloj de artikoloj, k. t. p., en ĉi tiu gazeto.



## Pro Amo

Provinca urbeto. La de ĉiuj estimata fabrikanto, estro de multaj bonfaraĵaj societoj, viro, kies poŝo estis ĉiam malfermita al progresemaj sed malriĉaj junuloj, festis la 70an datrevenon de sia naskiĝtago. La tuta urbeto, kies estro li ankaŭ estis, uzis la okazon por montri al li sian profundan dankemon kaj oni honoris lin per diversaj festoj kaj paroladoj. Publike kaj en la familiaj rondoj oni priparolis liajn bonfaraĵojn kaj en la fortan simfonion laŭdantan ne intermiksiĝis eĉ unu falsa tono. Samaĝuloj de li rakontis al la pli junaj samurbanoj interesajn kaj ofte tre humorajn epizodojn el lia vivo kaj la instruistoj montris eĉ en la lernejo al la infanoj lian vivon kiel vivon modelan. Tamen neniu sciis pri lia deveno. Li venis en la urbeton kiel fremdulo.

Por la vespero de la honortago li invitis la plej intimajn geamikojn de de sia domo, por esti kelkajn horojn en agrabla societo. Post la vespermanĝo iris tuta societo en la kamenĉambron, kie brulis en malferma kameno grandaj lignopecoj varmigante kaj samtempe lumigante la ĉambron. Li amis ĉi tiun duonlumon. La gastoj sidiĝis ĉirkaŭ la fajro sur malaltajn apogseĝojn. La konscio, ke ekstere estas malseka malvarmo — estis aŭtuno! — faris la ĉambran varmon duoble agrabla. La stranga duonlumo de la ĉambro mallaŭtigis iom la gajecon kaj seriozigis la pensojn de la societo; ĝi farigis iom pensema. Tial oni unuanime akceptis la proponon de la sinjoro doktoro, urba kuracisto, ke ĉiu rakontu sian plej mirindan travivaĵon.

Jus finis s-ro lernejestro sian rakonton. Ĉiuj jam estis rakontintaj, nur la mastro mem, la fabrikanto, ĝis nun silentis. Li estis per siaj propraj pensoj tiel okupita, ke li eĉ nerimarkis, ke ĉiuj ĉeestantoj lin rigardas kvazaŭ petante lian rakonton. Nur post kelka tempo lin vekis la ĝenerala silento el lia sonĝo — liaj pensoj vagadis en jam longe pasintaj tempoj — kaj preskaŭ perforte li deŝiriĝis de siaj agrablaj fantaziaĵoj.

«A jes, nun estas la vico je mi». Liaj okuloj denove ekrigardis tiel strange, kvazaŭ li rigardus scenejon de teatro sed senfine malproksiman. Malrapide li komencis.

«Mi estis ankoraŭ juna homo. Neniam mi estis timema, ĉar mia bona paŭjo estis prudenta virino kaj edukis min sen helpo de iu ajn timiga fantomo, kiel multaj patrinaj kutimas. Tamen mi eĉ paŝon ne faris sen revolvero enpoŝe kaj nakte ĝi kuŝis kompreneble sur la kesteto, el la lito facile atingebla. Ne estis timemo, sed sekuro kontraŭ eventualaĵoj.

Estis vintra vespero. La filino kaj la edzino jam de longe dormis. Mi multe laboris kaj fininte la laboron, mi enlitiĝis. Longe mi ne povis endormi, kvankam mi estis tre laca, ĉar miaj nervoj estis ekscititaj per la troa laboro. Mi provis kalkuli ĝis cent — ducent — certa rimedo por endormi. Mi kalkulis jam 132 kaj intermiksitis jam la nombrojn, signo, ke la dezirata dormo alproksimiĝas. Subite mi aŭdis palpadon ĉe la fenestro. Tuj estis denove miaj nervoj streĉitaj. La ĉambro estis malhela; nur la objektoj sta-

rantaj inter mi kaj la fenestro estis videblaj kiel nigraj siluetoj Klare mi ekvidis kapon, kiu alproksimiĝis mairapide al la pordo de la najbara ĉambro. Kion fari? Ĉu krii? Ĉu pafi? Nepre mi volis indulgi mian edzinon dormanta en la apuda ĉambro; ŝi eble pro ektimo malsaniĝus. Mi ekstaris kaj alproksimiĝis mallaŭte kaj per mallaŭtigita sed tre ordona voĉo mi diris: «Silentul!» Mi forŝovis lin en mian laborĉambron. Tie mi ligis liajn manojn — li tute ne kontraŭstaris. Mi vestis min kaj sonorigis la serviston por venigi policiston. La servisto estis maljunulo kaj pro tio daŭris lia vestado eterne longe — dank'al Dio! Dume mi sidigis apud la tablo, kontraŭ mi sidis mia kaptito. Li estis ankoraŭ junulo, bonvestita kaj havis inteligentan vizaĝesprimon tute ne krimulan. Agrabla sento de venkinto plenigis mian koron.

«Nu, mia bela birdeto, por vi oni konstruis pli fortan kaĝon ol estas mia ĉambro kun malfermitaj fenestroj. Sed vi devas esti tre malofta ekzemplero — bonvestita. Des pli bone, vi plibeligos la societeton de paseroj».

Nun li turnis al mi sian vizaĝon kaj mi ekvidis en ĉiu okulo — grandan larmon.

«Ho, ne moku, sinjoro», li diris per simpatia voĉo. «Ankaŭ mi havis patrinon, kiu min, estante bubeto, alten levis kaj kisis milfoje ĉiutage. Ankaŭ ĉe mia lulilo vidis neniu la malbonan feĵnon kaj mia vojo en la vivon ŝajnis esti ebenita — per la laboro de mia patro kaj per la amo de la panjo.

Kaj tamen...»

Min ekregis subite tia kompato kaj intereso por la junulo, ke mi ekstaris kaj malligis liajn manojn.

«Kaj nun rakontu senĝene vian historion».

«Sinjoro, simpla estas mia historio. Miaj gepatroj estis honestaj sed malriĉaj. Mi studis, ricevis oficon kaj vivis kiel miaj gepatroj simple sed honore, ĝis mi enamiĝis. Enamiĝis en knabinon el tiu ĉi urbeto. Por esti pli proksime al ŝi, mi decidis ŝanĝi mian oficon. La hazardo estis al mi favora, ĉar vi serĉas oficiston sed kun granda kaŭcio. Ĉion mi havas, bonajn atestojn, sufiĉan sperton, sed monon, tiel multe da mono, kiom vi postulas, mi ne havas. Mi tre amas la knabinon, sed ĉar ŝi estas el domo riĉa, ŝi ne estas al mi atingebla. Tamen ŝi amas ankaŭ min. Estis mia sola kaj ununura penso: esti ĉe ŝi, vidi ŝin. Pro mia amo mi preskaŭ freneziĝis kaj malsaniĝis. Tial mi decidis peti vian oficon liberan. Sed de kiu prunti aŭ preni la necesan mongarantiaĵon? Tutajn horojn mi vagadis tra la urbo «Mi bezonas monon; mi urĝe bezonas monon. Mi devas havi monon; mi nepre devas havi monon. Kiel havigi al si la monon? Kiel? Mi ankoraŭ ne scias. Sed mi havigos al mi la monon per ĉiu ajn rimedo mi havigos ĝin al mi». Ĉi tiun ideĉenon mi senĉese ripetis al mi. Miaj pensoj jam ne povis iri alian vojon, kiel radoj sur strato kun profundaj reloj. Kiel homo en deliro mi ĉiam ripetis la frazojn. La frazoj hipnotigis min. Ion alian mi ne povis pensi. Ĉion mi estus farinta, ĉion, se ĝi nur havigus al mi la necesan sumon. Hazarde mi legis pri granda ŝtelo en banko. Alta sumo estis la kaptajo de la rabis-

toj... ho, kaj dekonon de tiu sumo sufiĉus por ricevi vian oficon! Ĝi ebligus al mi vidi ĉiam mian fianĉinon, sen kiu la vivo estus al mi senseca, sencela kaj unuforma. Mi pripensis: se ankaŭ mi...?! Mi ankoraŭ ne kuraĝis finpensi», Ŝtelisto! rabisto! krimulo!» estis la respondo de mia konscienco. Mi ektemis. La fivortoj malebrügis min. Mi vidis la moralan profundecon en kiun mi falis. Sed la penso: «Se ankaŭ mi...» mi jam ne forlasis. Ĝi tenis min per fortaj ungegoj. Mi al ĝi al kutimigis eĉ tiel, ke post kelka tempo mi tute ne vidis la krimecon en tiu ago. «Mi ja poste povos iamaniere redoni la sumon kaj per fidela servo mi egalos la domaĝon», tiel mi trankviligis mian konsciencon. Mi estas konvinkita, ke mia fianĉino mem estus ŝtelinta la necesan sumon al sia riĉa patro, se mi estus al ŝi dirinta mian planon. Sed mi ne volis riski ŝian honoron. Tial mi riskis la mian kaj mi — perdis ĝin».

«Ankoraŭ ne» mi respondis. Mian komencan indignon anstataŭis profunda kompatemo. Lia rakonto min forte emociis. Mi ne estis kapabla de trui lian vivon. Mi tuj decidis.

«Bone, mi donos al vi la oficon sen kaŭcio kondiĉe, ke vi kondukos vin unu jaron je mia kontento. En tiu okazo vi post unu jaro edziĝos kun via fianĉino. Ĉiujn malhelpaĵojn — se ili estos nur monaj — mi forigos. Kredu je mia vorto. Sed dum la tuta jaro vi ne parolos kun via fianĉino: estos pruvo por via kaj ŝia amo. Ĉu vi konsentas kun la kondiĉoj?»

Anstataŭ respondi li ekstaris, genuigis kaj kisis miajn manojn. — — —

La maljuna servisto frapis je la pordo. Mi starigis lin kaj diris: «Nu, morgaŭ je la oka». Al la servisto mi aldonis: «Malfermu al la sinjoro librotenisto la pordon»!

Kiel ŝtelisto li venis tra la fenestro en mian domon, kiel homo honora li ĝin tra la pordo forlasis.

Matene mi jam estis je la 7<sup>a</sup> horo en mia laborĉambro kaj atendis lin. Mia nokta travivaĵo ŝajnis esti sonĝo kaj por certigi min pri ĝia realeco, mi demandis la serviston, je kia horo mi lin vokis. «Je la 1.<sup>a</sup>».

Nun mi pripensis la tutan aferon. Ĉu mi ne agis iom naive? Preni lin kiel oficiston? Ha, kapro kiel ĝardenisto! Kio okazos, se li venos? Kaj li ne venos! Ne, li venos! Ĉu lia konduto estus nur komedio? Tiel mi meditis. Subite ekfrapis iu je la pordo.

«Mi petas»!

Jes, estis mia nokta gasto. Li prezentiĝis, petis je ofico, montris atesojn kaj kondukis tiel, kvazaŭ li ne estus min ankoraŭ vidinta. Lia konduto min iom surprizis, sed tamen ĝi plaĉis al mi.

Mi akceptis lin oficiale. Neniam mi tion bedaŭris, ĉar neniam mi ankoraŭ havis tiel fidelan kaj konscian oficiston. Sed kiu estas la fianĉino? Mi lasis lin observi tage kaj nokte. Sed li konis ŝajne nur du mondojn: mian oficejon kaj nokte lian ĉambron. Neniam li foriris en restauracion aŭ teatron. Li havis neniam amikon kaj la vesperojn li pasigis per legado. Neniam oni lin vidis en societo de iu aĵu fraŭlino. Eĉ mian filinon, se ŝi venis en mian oficejon, li kvazaŭ ne rimarkis. Mi fariĝis scivolema.

10  
110

Venis la jartago. Venis ankaŭ li en mian laborĉambron kaj dankis al mi por mia konfido.

«Vi estis brava, kaj pro tio mi forstrekos ĉion pasintan el mia memoro. Sed mi devas ankoraŭ plenumi mian promeson rilate vian fianĉinon. Kiu ŝi estas?»

«Via filino!»

Mi eksaltis de mia seĝo je surprizo.

«Kiu?»

«Via filino, sinjoro estro!»

Li diris la veron. Mia filino amis lin tiel freneze kiel li ŝin kaj post mal-longa kontraŭstaro mi donis al li mian filinon kaj kiel doton la fabrikejon».

Ĉiuj ĉeestantoj ekrigardis la bofilon de la maljuna fabrikanto. Sed li ja neniam servis ĉe sia bopatro! — ?

Ridetante aldonis la maljuna fabrikanto:

«Pardonu geamikoj, ke mi iom interŝanĝis la rolojn. La fabrikanto bonulo estis mia bopatro kaj la junulo estis mi!

Jes, ĉiu havas sur sia pasinteco ian nigran makulon».

THEODOR KILIAN

Premiita en la XI Internaciaj Floraj Ludoj



## La premio

Poeton — tre verŝajne pro kaprico —  
Fortuno foje dotis kun gracio:  
«Poet', ĉar fine venis via vico,  
jen prenu por vi: gloro, monpremio!»

Li kuris al patrino pala eta...  
Ŝi kiskaresis lin kun dolĉa ravo:  
«Komuna estas ĝoj', sed fil' poeta,  
la glor' kun mono restu via havo...»

«Sed, panjo kara, panjo, mi vin petas,  
ne rompu filan ĝojon, per obstino!  
La mono estu vial... Mi aĉetas  
ŝuetojn varmajn por vi, ho patrino...»

Persvadis li kaj ŝi larmante cedis:  
«Jes... varmajn ŝuojn por maljunulino...»

El tiu mon' ŝi ŝuojn ne aĉetis,  
sed ŝia fil' — tombkrucon al patrino.

JULIO BAGHY

Menciita en la XI Internaciaj Floraj Ludoj



## Principoj de Esperanto

Origino. Gramatiko. Vortaro.

Literaturo. Evoluo.

1925

(Unuafoja publikigo speciale konsentita de la aŭtoro al «Kataluna Esperantisto».)

(daŭrigo)

La vokala alisonado konsistas en tio ke la antaŭa vokalo tone altiĝas, se la lasta estas pli alta ol ĝi, kaj male. Alta vokalo povas ekzisti apud la alta, malalta vokalo apud la malalta. La duonvokaloj ankaŭ influas sammaniere. Ni supozu ekzemple ke en vorto *la* sonas la normala meza *a*; nu, tiam ni komparu la sonojn *a* en la vortoj: *aŭlo-ajlo-vilao-balai*. Ni tiam sentos diversajn tonojn de *a*. N kiu staras inter vokalo kaj posta konsonanto preskaŭ ĉiam kaŭzas la alisonadon tiamaniere ke la antaŭa vokalo iĝas naza, kaj la normala *n* malaperas. Ĝeneralmaniere, la alisonado estas kaŭzata de la sona harmonio, kiu postulas la interadaptigon de la konsistaj sonoj.

En malrapida posilaba elparolado oni povas eviti ĉian alisonadon, kaj tia elparolo estas teorie sola ĝusta, eĉ rekomendinda por komencantoj, kursestroj kaj telefonantoj. «Laŭ la teoria vidpunkto ni devas elparoli ĉiun sonon severe aparte; sekve se ni deziras paroli severe regule, ni devas elparoli «pan-jo», «san-go», «mi-a». (Zamenhof, Of. Gaz. 1911, p. 222).

La sonoj ne egalas laŭ sia reciproka kvalito kaj rolo, ankaŭ laŭ sia maniero de la kuniĝo. Ekzemple *r* «volonte» najbaras kun *t*, nevolonte kun *ŝ*, tute ne kun *ĵ*. Same, *k* ofte najbaras kun *l*, *r*, *s*, sed neniam kun *m*, *d*, almenaŭ en la Fundamento. Tiu rimarko ne koncernas la kunmetaĵojn, nur la radikojn.

La sonoj kombinitaj en iu vorto estas pli aŭ malpli facilaj por elparolanto; oni diras ke la vorto estas pli aŭ malpli belsona. Ĝenerale, la sona harmonio, la alternado de konsonantoj kun la vokaloj, la neesto de alisonado, estas kondiĉoj por la belsoneco; kaj male, la sona malharmonio, la amasiĝo de konsonantoj aŭ de vokaloj, la alisonado, estigas la malbelsonecon. Se kelkaj nacioj toleras aŭ ŝatas la amasiĝon de konsonantoj (ekz. germanaj *Pfipps*, *Obst*, *Handpferd*, serbaj *rt*, *trst*, *čvzst*, *srbin*), la aliaj, precipe orientaziaj, tion ne toleras. Manĝuro, ekzemple, ne povas elparoli eŭropan vorton «frank» alie ol «faranga». Por faciligi nian parolatan lingvon, oni povas atenti pri la kondiĉoj de la belsoneco. Lastatempe oni komencis ion tiurilate, ekz. proponante novaĵojn: monarko (monarĥo), buĝeto (budĝeto), hodia (hodiaŭa), espozi (ekspozi), eskurso, (ekskurso) multekolora (multkolora), vortofarado (vortfarado), kma.

§ 7. Akcento estas maniero elparoli plialte kaj plilonge, ol kutime, la akcentatan silabon. Ĝi falas antaŭlastan vokalon de' l vorto kunfinaja, kaj la lastan de' l vorto apostrofita. Tial apostrofo povas montri finan akcenton en fremda vorto: *Paskal'*, *Ali' Bordo'*, *Neva'*, *Moskva'*, *Oman'*.

La fraza akcento falas tiujn vortojn de la frazo, kiujn oni volas elstariĝi. *Ne li estas kulpa pri tio, sed lia frato*. En ĉi frazo la frazakcento falas sur *li* kaj sur *frato*.

La fraza tono estas natura rimedo por aldone esprimi tion, kion ne povas komprenigi la solaj vortoj kun iliaj akcentoj. En ordinara parolo la tono aperas sen nia intenco, eĉ kontraŭ nia volo, kiel reflekto de ia emocio aŭ sentimento. Unu sama frazparto («kiam vi venis») tonas malsame en jenaj frazoj:

*Kiam vi venis, mia amiko?*

*Kiam vi venis, mia amiko, estis pluvo.*

En la unua plitonas vorto *kiam*, en la dua *venis*.

Eĉ unu vorto, dirita kun la tono, povas multon esprimi en la viva interparolo. La gestoj kaj mienoj multe helpas al la esprimoriĉa interparolo.

Krom la ordinaraĵ artikumataj sonoj, skribataj perlitere, estas la alispecaj, por kiuj ne ekzistas apartaj signoj, ekz. sonoj de rido, ĝemo, tuso, terno, singulto, nazblovo, langoklako, ankaŭ blekoj kaj krioj de bestoj, birdoj, fine sonoj de bato, frapo, falo, knaro, gutado, fluado, ktp. Oni penas ilin konvencie signi per la literoj, ekzemple: ha-ha, ĥi-ĥi, oh, uf, oj, aj, ĉrip, kra-kra, muu, grr, miaŭ, haŭ-haŭ, ap, ding-dong, tam-taram, kc.

Parolo, deklamo, kanto, — prezentas tri suprenirajn ŝtupojn de la voĉa esprimado. Gramatiko studas el ili nur parolon, lasante la du ceterajn al belartoj.

§ 8. Se Esperanto akceptas sensaĝe la jam internacian natursciencan terminaron, ĝi per tio akceptas aldonajn literojn (q w x y) kiuj ekzistas en tiu terminaro. Jam delonge tiuj kvar literoj estas uzataj en Esperanta literaturo por skribi proprajn nomojn: Grabowski, Verax, Mybs, Baquet, Won Kenn, Cox, Loy, Warden, Eyquem, kc. Kvankam tiuj aldonaj literoj ne apartenas al pure Esperanta aboco, tamen ilia fakta uzado necesigas starigon de ilia konvencia elparolo, se oni ne ĉiam notas la originan elparolon de tiu aŭ alia propra nomo.

§ 9. Krom pure naciaj nomoj, ekzistas nomoj de landoj, urboj, riveroj, kiuj apartenas ne al unu nacio, sed samtempe al la pluraj. Por starigi tiajn nomojn oni sekvas la principon de pleja internacieco, penante ekvilibrigi la ortografion kun la elparolo, ĉio en limoj de Esperanta aboco kaj fonetiko. Tiel ekzistas nomoj: Alpoj, Pireneoj, Karpatoj, Reno, Rono, Dunavo, Besarbio, Galicio, Macedonio, kc.

La demando pri ujo (lando) estas solvebla kontentige, se ni forigos ĉian partiecon kaj konsideros la realaĵojn. Laŭ la Fundamento la sufikso -uj- interalie signifas «lando loĝata de», nenie la Fundamento difinas ĝin kiel «regno». Kaj Zamenhof tre bone sciis diferencon inter la regno kun di-

versaj subpremitaj gentoj kaj la nacio, kies teritorio apartenas al pluraj ŝovinistaj regnoj. Estas ekster dubo, ke la Zamenhofs frazo: «La rusoj loĝas en Rusujo kaj la germanoj en Germanujo» (Ekzercaro § 40), tiu frazo signifas nur ke la rusoj loĝas en la rusa teritorio ktp. Certe, Zamenhof ne povis skribi: «En Rusujo loĝas la rusoj, la poloj, la latvoj, la kirgizoj, ..» ĉar por nomi la rusan imperion oni uzis vorton «Ruslando». Se ni volas ĝuste kompreni «ujon», laŭ la Fundamento, ni devas diri *Francujo* por la tuta landaro kie oni parolas france: granda parto de la regno, okcidenta Svisio, suda Belgio, Kanado, Haitio, kc. Kaj por nomi la francan regnon ni povas diri *Francio*. Ni ne rajtas diri *Kanadujo* ĉar ne ekzistas kanada lingvo, nek *Svisujo*, *Belgujo*, *Aŭstrujo*, ĉar tie loĝas francoj, germanoj, italoj, flamandoj, kc. La naciaj nomoj de landoj ordinare ne notas la etnografiajn teritoriojn, nur la regnojn: Suisse, Schweiz, Belgique, Belgie, Belgium, Autriche, Österreich, Austria, Avstrija, Italie, Italia, Russia, Russie, Rusija, Rossija, kma. La provincoj kaj regionoj ordinare portas karakterizan sufikson -i- en plimulto da eŭropaj lingvoj: Picardie, Normandie, Algérie, Galicie, Lombardie, Lombardia, Galicia, Normandia, Albania, Macedonia, Besarabia, Siria, Armenia, Rumelia, Sicilia, Kalabria, Apulia, Kampania, Bavaria, Bohemia, Moravia, Ungaria, Podolia,.. Por ili sufiĉas ŝanĝi *e, a* je nia *o*, por ricevi tute taŭgajn nomojn.

§ 10. Oni proponis, por justa elekto de la internaciaj radikoj konsulti la statistikon, kiu permesas kvazaŭ pesi la relativan uzatecon de la radikoj en ĉiu nacio. Tiucele oni uzas tabelon da nombroj de lingvouzantoj (naciaj nomoj kaj fremduloj kune):

En milionoj da homoj:

angla . . . . .	150	ĉeĥoslovaka . . . . .	11
rusa . . . . .	100	nederlanda . . . . .	10
germana . . . . .	80	blankorusa . . . . .	8
hispana . . . . .	70	greka . . . . .	7
franca . . . . .	60	sveda . . . . .	6
itala . . . . .	40	dan-norvega . . . . .	5
ukrajna . . . . .	35	latvo-lituva . . . . .	5
pola . . . . .	25	kelta . . . . .	5
sudslava . . . . .	15	kataluna . . . . .	2
rumana . . . . .	12	albana . . . . .	1

Sub la nomo franca estas enkalkulita la provanca; sub la sudslava la serba, la horvata, la slovena. Sub la nederlanda la hollanda, la flandra. Sub la kelta la bretona, la kimra, la irea, la skota, la manksa; sub la rumana la valaka, la moldava; sub la albana la gega, la toska.

Uzante tiun statistikon, neeviteble malprecizan, oni memoru ke ĝi koncernas ĉiujn parolantojn, eĉ infanojn, kamparanojn, kiuj ne konas vortojn sciencajn; librecajn, altklasajn.

§ 11. Malfacila estas demando pri tio, kian sencon ni devas asigni al

la genraj botanikaj kaj zoologiaj nomoj, ekz. al la *Aquila*, *Passer*, *Ulmus*, *Brassica*, *Acer*,... kiujn ni volas identigi al Esperantaj: *aglo*, *pasero*, *ulmo*, *brasiko*, *acero*,...

La scienca senco estas tre larĝa: ĝi atribuas al ĉiu genro ĉiujn ĝiajn specojn de la tuta mondo.

La nacia senco estas tre mallarĝa: ĝi atribuas al la genra nomo nur tiun specon kiu estas nacie konata en ĉiu aparta loko; malofte ĝi entenas la plurajn specojn.

La scienca vidpunkto kaj la Fundamenta traktado pri tiaj nomoj — ambaŭ ne kontentigas la internacian lingvon, kiu celas fariĝi tutmonda.

§ 12. Ĉi sube ni havas ekzemplojn el la fleksiaj lingvoj, komparitajn kun la samsencaj Esperantaj vortoj, en kiuj la aglutina nevarieco kontrastas kun la fleksia varieco:

FRANCA	ESPERANTA	ESPERANTA	RUSA
voir	vidi	sidi	sidjetj
vois	vidas	sidas	siĵu
vis	vidis	sidis	sidjel, sjel
verrai	vidos	sidos	sjadu
vu	vidita	sidita	sajen
voyant	vidanta	sidanta	sidjaĉij

§ 13. Esperanto nun havas pli ol 10.000 elementojn, kiujn oni povas klasigi jene:

finajoj . . . . .	12
afiksoj . . . . .	53
rilataj vortoj . . . . .	205
radikoj . . . . .	10.000

Plurala finajo -j neniam uziĝas por la artikolo kaj por la verboj, tamen se en estonteco oni volus ĝin ambaŭokaze uzi tio ne estus kontraŭ la spirito de Esperanto.

Esperantaj duoblaj temoj estas konstruataj laŭ regulo: difinanto antaŭ difinato. Sammaniere oni agas en la germana kaj angla. En la rusa kaj franca oni ifoje sekvas la malan regulon: unua vorto estas la ĉefa; ekzemple:

fr.	<i>chien-loup</i>	lup-hundo
fr.	<i>terre-plein</i>	plat-tero
r.	<i>ptica-muĥa</i>	muŝ-birdo
r.	<i>baba-jaga</i>	jaga virino



Krom la afiksoj, troveblaj en la Fundamento, estas uzataj aliaj afiksoj jen rekonataj kiel tiaj (sed neoficialigitaj), jen kaŝitaj en la temoj, kiujn oni konsideras kiel unuoblaj radikoj. Antaŭe ni vidu la oficialajn elementojn, kiujn oni ne citas kiel afiksojn, malgraŭ tio, ke ili fakte estas tiaj:

- a) *prefiksoj*: eks- pra-
- b) *sufiksoj*: ant at int it obl on ont op ot

Krom tio povas servi kiel prefiksoj: ĉiuj prepozicioj, ĉiuj nombroj, ankaŭ jenaj vortetoj — plej, pli, plu, po, tre, tro, mem, fi, ve, jes, ne, ambaŭ, sin, sia, mia, unua, ktp.

#### *Neoficialaj prefiksoj:*

*a* - ne, sen, mal: anormala, amoral, amorf, ...  
*ak* - pinta: akra, akuta, akacio, ...  
*amfi* - ambaŭ: amfibio, amfibrako, ...  
*anti* - kontraŭ: antikristo, antipatio, ...  
*aŭto* - sin, mem: aŭtobiografio, ...  
*bi* - du, duobla: bikvadrato, bigamo, ...  
*bio* - vivo, viva: biologio, biografio, ...  
*cis* - maltrans: cisalpano, cislejta, ...  
*di* - du, duobla: diftongo, didimo, ...  
*eŭ* - bona: eŭfonio, eŭfemismo, ...  
*geo* - tera: geologio, geografio, ...  
*heksa* - ses: heksametro, heksagono, ...  
*ko* - kun: kooperi, kolegio, ...  
*mikro* - eta: mikrokosmo, mikrono, ...  
*mis* - malbone: misuzi, misordo, ...  
*neo* - nova: neologismo, neolatina, ...  
*pan* - tut, ĉies: panteismo, paniko, ...  
*pre* - antaŭ: prefikso, prehistoria, ...  
*pseŭdo* - nevera: pseŭdonomo, ...  
*retro* - malantaŭen: retrospektiva, ...  
*sin* - kun: sinoptika, sintezo, ...  
*te* - dio: teismo, teologio, ...  
*ultra* - trans, ekster: ultravioleta, ...

#### *Neoficialaj sufiksoj:*

- *acoj* vegeta familio: liliacoj, ...  
 - *acio* ado, aĵo, antaro: deklaracio, ...  
 - *ala*: sociala, neŭtrala, normala, ...  
 - *ario* oficulo: komisario, notario, ...  
 - *atorio* ejo: observ-, purgatorio, ...  
 - *ela*: fidela, modela, nobela, kruela, ...  
 - *enco*: scienco, kadenco, konkurenco, ...  
 - *enda* kion oni devas: legenda, farena, ...

- *eo* vegetaĵo: nimfeo, alteo, centaŭreo,...
- *iero*: bankiero, inĝeniero, kanceliero,...
- *iko*: lingvistiko, mekaniko,...
- *io*: fotografio, telefonio, tipografio,...
- *iro*: kavaliro, oficiro, pioniro,...
- *ito* inflamo: bronkito, apendicito,...
- *ito* ŝtono: granito, sienito,...
- *iva* kapabla: aktiva, produktiva,...
- *izi*: elektrizi, centralizi,...
- *logio* scienco: geologio, biologio,...
- *logo* sciencisto: geologo, biologo,...
- *metro* ilo: mikrometro, termometro,...
- *oida* formesimila: sferoida,...
- *olo* vegetaĵo: lupolo, fazeolo,
- *ono* patrono, matrono, fripono,...
- *oro* oficulo: senatoro, revizoro,...
- *oro* ilo: motoro, elevatorio,...
- *oza* riĉenhava: sabloza, feroza,...
- *patio* sento: simpatio, telepatio, ..
- *poni* meti: disponi, komponi,...
- *skopo* vidilo: mikro-, teleskopo,...
- *teko* ejo: biblioteko, pinakoteko,...
- *uaro* ejo: buduaro, trotuaro, kuluaro,...
- *uro* faritaĵo: skulpturo, miksturo,...

Oni multe skribis pri la kategorieco de la radikoj, kiuj estas esence aŭ substantivaj, aŭ adjektivaj, aŭ verbaj, aŭ adverbaj. La radika kategorieco certe ekzistas iomgrande, sed ĝi estas alispeca ol oni volas ĝin prezenti. Unue la termenoj mem: «substantiva radiko», «adjektiva radiko», kc., estas netaŭgaj, ĉar ili jam dekomence trudas malĝustan ideon pri la kategorieco.

La vortoj «substantivo», «adjektivo», kc. estas tre klaraj termenoj, pure naciaj (aŭropaj), kiuj ne havas ekziston en Esperanta gramatiko. Tiuj termenoj havas sencion en fleksiaj lingvoj, sed ne en la aglutinaj, kia ja estas Esperanto.

En la naciaj substantivoj oni ne povas ĉiam distingi la radikon de la finaĵo, ekz. en la franca *chat*, angla *cat*, slava *koť*, la substantivo kaj la radiko estas la samo; al la nacia substantivo korespondas iom (sed ne tute) la Esperanta ovorto, ekz. *kato*, formaĵo duobla: *kāt-o*, kiu facile disfalas, se necesas, por doni: *kāt-a*, *kāt-e*, kc.

La samon oni povas diri pri la nacia adjektivo, vorto kristaliĝa, al kiu neplene korespondas nia avorto, formaĵo provizora: *kāt-a*, *bon-a*

Inter multegaj Esperantaj evortoj ekzistas kelkaj, kiuj preskaŭ korespondas al la naciaj adverboj, ekz. hodiaŭ, ĉiam, neniam, ks. Sed ĝuste ilin ne tuŝas la pretendata kategorieco, ĉar ili ja ne estas radikoj, sed jam pretaj vortoj.

La verboj ekzistas en Esperanto nur kiel la radikoj kun finaĵoj *i*, *as*, *os*, *is*, *us*, *u*. En momento kiam radiko perdas sian verban finaĵon, ĝi refariĝas neŭtra rilate je la kategorieco suprenomita. En jena tabelo oni vidas ekzemplojn de la radika adaptado al la kvar gramatikaj (sintaksaj) formoj.

substantiva rolo	adjektiva rolo	verba rolo	adverba rolo
agaco	agaca	agaci	agace
atento	atenta	atenti	atente
aprobo	aproba	aprobi	aprobe
domaĝo	domaĝa	domaĝi	domaĝe

Tamen, kelkaj teoriistoj diras ke radiko *agac* estas esence substantiva, *atent* adjektiva, *aprob* verba, *domaĝ* adverba. La kuranta praktiko de Esperanto ĉiupaŝe renversas tiun teorion, kiun brile, sed vane, disvolvis Antido.

Se oni nepre volas klasigi la radikojn, oni povas distingi:

- a) *radikoj personaj*: abat, barbir, car, doktor, edz, frat,...
- b) *radikoj animalaj*: alk, bird, cerv, dog, ezok, fazan, gazel,...
- c) *radikoj kreskaĵaj*: abi, betul, cipres, datur, ebon, fab, kanab,...
- ĉ) *radikoj ilaj*: broso, grifelo, sabro,...
- d) *radikoj koloraj*: blank, flav, griz, nigr, ruĝ,...
- e) *radikoj sonaj*: bru, tint, tondro, voĉo, zum,...
- f) *radikoj agaj*: tranĉo, tondro, hak, frapo, bat, atako,...
- g) *radikoj stataj*: staro, kuŝo, pend, sid,...
- ĝ) *radikoj tempaj*: horo, tago, monato, semajno, jaro,...

Kaj ankoraŭ multaj aliaj kategorioj...

Ĉiu radiko, se tion postulas la frazfaro, alprenas finaĵon *o*, aŭ *a*, aŭ *e*, aŭ *i*,... por ludi konforman rolon en la frazo.

La teorio pri la kategorieco de Esperantaj radikoj aperis pro tio, ke Zamenhof difinis en la U. V. la radikojn per la naciaj tradukoj, devige kategorie. Se Zamenhof ilin difinis per Esperantaj vortoj, tiu teorio eĉ ne ekzistus. Ke Zamenhof ne celis marki la kategoriecon, sed nur doni plej oportunan nacian tradukon, tion pruvas la radikoj «ambiguaj» (por la nomitaj teoriistoj) sed tute klaraj por la ceteraj studentoj. Ekz. radiko *intern* estas tradukita jen adjektive, jen adverbe, *sput* jen verbe, jen substantive. Tia diferenco venas de la nacilingvoj, kiuj neegale esprimas la samajn ideojn. Se ni objekte analizos radikon *bril*, por ekzemplo, ni vidos, ke ĝi egale bone signifas lumon («substantivo»), kvaliton de lumo («adjektivo»), luman vibradon («verbo») manieron de lumo («adverbo»).

P. STOJAN L. K.

(daŭrigota)

## Pro... kaj Por...

*Barcelona Esperanto Societo.* — Ĝi publike prezentigis al la esperantistoj la 27 de marto ĉe Ateneu Enciclopèdic Popular (Barcelona). Bela vespero estis ĝuata de la multnombra ĉeestantaro. Ne nur la ĉiam laŭdinda tasko de F-ino. Palmira Castellví, kiu regalis la aŭskultantaron per siaj belaj esperantaj kantoj, sed ankaŭ la belaj poezioj deklamitaj estis bela frapo de la festo.

Ni varme deziras, ke la celoj montritaj de la prezidanto de B. E. S. okaze de lia malferma parolado rapide estu atingitaj por la bono de nia sankta afero kaj por la rapida akcelado de nia movado en Barcelona.

*Radio Barcelona.* — La 7 de la kuranta monato Radio Barcelona, kiu tiel bonvole akceptas kaj alte juĝas Esperanton, disaŭdigis Esperantan Feston. Kanto, poezio, paroladoj plenigis la tutan tiutagan programon. F-ino Castellví, D-ro. Bartomeu. Prof. A. Domènech kaj diversaj lernintoj de la radio-kurso partoprenis la belan feston. Kun profunda emocio ni aŭskultis la fonografacilindrojn de D-ro. Zamenhof, Bourlet, Grabowski, k. a. — Pro subita malsaniĝo de F-ino. Montserrat Grau oni ne povis ludi, kiel oni anoncis, akton de Ifigenio en Taŭrido.

Eksterlandaj samideanoj, kiuj aŭdis la esperantan feston, estas petataj sendi gratulan poŝtkarton al Radio Barcelona, str. Casp 12, Barcelona.

*En la ĝenerata kunveno* de la Grupo «Barcelona Stelo», oni elektis la jenan estraron: Prez. C. Domènech; Vicprez. E. Alba; Sekr. E. Capdevila; Vicsekr. J. Pruna; Kas. A. Valdepeñas, Kalk. M. Palomera; Bibliot. A. López; Voĉdonantoj: J. Gili, J. Guixà, I. Martínez kaj Ll. Hernández. — La 8an de Marto komencis kurso de Esperanto en la Grupo «Barcelona Stelo» sub gvido de profesoro S-ro. E. Capdevila, ĉeestata de ĉirkaŭ 15 personoj. La samideanoj S-roj. C. Domènech, A. Valdepeñas, J. Bargalló kaj Ll. Hernández, starigis komercan entreprenon sub la nomo «Komercesta Kompanio Kataluna. — Rezentoj per Esperanto. — Barcelona». por importi, eksporti kaj peradi dankon al nia karega helplingvo. — La esperantaj komercaj entreprenoj dezirantaj disvastigi niajn artiklojn en Katalunujo, sendu kondiĉojn, katalogojn kaj specimenojn al la Direktoro de K. K. K. S-ro. C. Domènech, Marqués del Duero, 101. Barcelona. — La «Komercesta Kompanio Kataluna» estas jam nomita filio de Esperanta Komercesta Grupo el Dresden.

*Esperantista Konferenco en Locarno.* — La ĵus okazintan Konferencon partoprenis la prezidanto de K. E. F. S-ro Delfí Dalmau, reprezentante la katalunlingvajn esperantistojn. — Nia maja numero publikigos raporton pri la ĉefaj aspektoj de la Konferenco.

*Festo ĉe Barcelona Stelo.* — Por la 17 de aprilo Barcelona Stelo anoncas esperantan feston ĉe sia sidejo Marqués del Duero, 101. Oni ludos



«Amors Esperantistes» de nia amiko Joan Gili Norta, krom deklamado, koncerto, kantado, k. t. p. Ni varme deziras bonan sukceson al la festo.

*Esperantista Vivo.* — Nia kara ĉefredaktoro, Prof. Delfi Dalmáu, la 24 de marto edziĝis kun F-ino. Carme Argemí Suana el Terrassa. Al la multaj gratuloj kaj bondeziroj de li ricevitaj ni aldonas nian plej sinceran kaj koran esprimon de estimo. Al la nova esperantistino nian respektoplenan saluton. — Komitato de K. E. F. kaj Redakcio de K. E.

*Pri Kritiko.* — Ofte, tro facile oni plendas pri kritiko. Tamen neniu estas perfekta kaj tial ĉiu el ni devus deziri kritikon de siaj agoj, por estontece plibonigi ilin.

Kiam aperas ĵurnalo aŭ libro malbone tradukita aŭ redaktita, estas ne nur rajto sed devo montri ĝiajn nekorektaĵojn por ke la komencantoj *ne legu ĝin*. Se ne, malfacila legado kredigos al ili, ke Esperanto estas neklara komplikita lingvo, kaj baldaŭ, perdinte kuraĝon, ili forlasos ĉion.

Kompreneble, la afero montriĝas multe pli grava pri lernolibro, kiu povus erarigi la lernantojn, kaj eble okazigi, ke neniam ili konu la veran Esperanton.

Se iu samideano, kvankam nove veninta, deziras per ia publikigo alporti sian helpon al la komuna laboro, li, antaŭ ĉio, prenu konsilon de iu pli sperta, kaj tiam, tre kredeble, li povos liveri ion taŭgan. Sen tiu antaŭzorgo, plej ofte liaj klopodoj fariĝos nur malutilaj, kaj tiam li ne rajtos plendi pri kritiko; des pli ĝentile akceptinda ju pli ĝentile ĝi estis prezentata. — SPECTATOR. — El «*Le Monde Espérantiste*».

*Ĝeneralajoj.* — Estas konate, ke la radioamatoro apartenas al speco de bestoj, nomataj latine *homo sapiens* (esp. : homo saĝa??). Same, kiel ĉiu alia «homo sapiens», ĝi posedas du brakojn, iafoje kapon kaj eĉ edzinon. Tamen la radioamatoro estas facile distingebla laŭ la surkreskaĵoj, kovrantaj ĝiajn orelojn kaj nomataj «telefonaŭdiloj».

Ĝenerale la radioamatoro ne havas liberecon de transmoviĝo, ĉar ĝiaj telefonaŭdiloj estas ligitaj per dika metalfadeno al ricevilo. Tiamaniere ĝi forte similas koralojn kaj eĉ vegetaĵojn. Tamen Brem sukcesis unufoje observi tiel nomatan «vagantan radioamatoron», kiu rapide moviĝis, sin direktante al magazeno de radiaĵoj.

Ankaŭ Darwin en sia fama verko «Deveno de specoj» rakontas, kiel li foje observis sur la tegmento de kontraŭa domo grandan beston, rapide moviĝantan inter reto de fadenoj. Komence li konsideris ĝin, kiel gigantaran araneon, sed post kelkaj koroj la eminenta sciencisto komprenis, ke tio estas radioamatoro, aranĝanta sian antenon. — El «*Internacia Radio Revuo*».

## Grava pliriĉigo al la esperanta literaturo

Al la Esperantistaro tutmonda!

La Esperanta literaturo sendube jam estas granda. Tamen, laŭ la opinio de diverslandaj kompetentuloj, ĝi ankoraŭ ne estas sufiĉe granda. Oni diras: Malgrandaj nacioj ne povas ĝui la tutmondan literaturon samamplekse kiel la grandaj. Ju pli malgranda iu nacio estas, des malpli da alilingvaj verkoj estas tradukataj en ĝian lingvon, ĉar por la tradukaĵoj mankas la ebleco de sufiĉa vendiĝo. Se oni per unu fojo, nome per Esperanto, al ĉiuj nacioj havigus la literaturajn trezorojn de la aliaj, tio instigus antaŭ ĉio la anojn de malgrandaj nacioj al la lernado de Esperanto. Oni eligus la malgrandajn naciojn, pere de Esperanto, el literatura izoleco kaj havigus al ĉiuj nacioj trezorojn, kiuj alie nur al proporcie malmultaj interesigantoj povas fariĝi konataj.

Ni opinias, ke penindas fari provon en la dirita senco. Tial ni ĝojas pri tio, ke *prezentiĝas okazo por realigi la ideon*: La eldonejo *Rudolf Mosse* en Berlino, kiu jam de kelka tempo grandstile okupas sin pri Esperanto kaj praktike uzas ĝin en kelkaj el siaj eldonaĵoj — ekz. en la granda Germanregna Adresaro por Industrio, Metio kaj Komerco kaj en la Semajna Eldono de *Berliner Tageblatt* — intencas eldoni sub la titolo

### BIBLIOTEKO TUTMONDA

multampleksan, malmultekostan kaj bele aranĝitan bibliotekon, kiu respondu al la supre preparolita celo. La biblioteko prezentos elekton el la plej bonaj literaturaĵoj tutmondaj kaj ankaŭ originalajn verkojn de kompetentaj Esperantistoj, ĉu beletristikajn, ĉu popularsciencajn. La unua numero antaŭvideble elvenos en Aprilo nunjara; ĝis la fino de l' jaro entute elvenos 24 numeroj.

Ĉiu numero de la biblioteko enhavos proksimume 60-64 paĝojn en formato de 10, 5 x 17 cm. Pro tre malalta prezo ponumera ne estas eble, liveri unuopajn numerojn, sed oni nur povas aboni laŭ serioj de po 10 numeroj. La prezo de *unu serio, inkluzive afrankon* por la alsendo de ĉiu kajero tuj post elveno, estas 4 RM aŭ 1 Dol. aŭ 5 sv. fr. aŭ egalvaloro en alia valuto. *La koncerna sumo devos esti antaŭpagata kune kun la alsendo de la mendo.* Mendojn kaj pagojn oni adresu nur al la firmo *Rudolf Mosse, Buchverlag, Abteilung Esperanto, Berlin SW 68, Zimmerstrasse 61* (Germanujo).

Do, vi samideanoj, kiuj deziras posedi tiun altvaloran bibliotekon malmultekostan, *mendu senprokraste!*

Esperantista Literatura Asocio

J. ZSCHEPANK

Prezidantino

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

Presejo J. Vinyals, Plaça Constitució, 6 : BARCELONA (Sarrià)

# ATENTU

Ĉu vi volas helpi efike

K. E. F.?

Pagu tuj vian abonon!

Pagu tuj vian kotizaĵon!

Instigu viajn amikojn aliĝi al nia Federacio!

Diskonigu nian gazeton kaj varbu abonantojn!

Venigu multajn esperantistojn al nia Kongreso en  
Santa Coloma!

Ju pli multe vi laboros por tiuj punktoj, des pli efike  
vi helpos nian movadon.

---

Adresu ĉion: Carrer València, 245-Barcelona

# KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE  
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto», València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezroj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.

Ĉu vi deziras aliĝi al "Universala Esperanto - Asocio", "Kataluna Esperantista Federacio", Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara", aŭ aboni al "Esperanto", "Kataluna Esperantisto", "Literatura Mondo", "Heroldo de Esperanto", kaj "Esperantista Junularo?" Petu tuj detalojn al Ferdinando Montserrat, str. Villarroel, 107, 2. - 2.<sup>a</sup>, Barcelona. — Ankaŭ li peros pri ĉiuj esperantaj libroj naciaj kaj fremdaj, steloj k. t. p.

## TAŬGA kaj MALKARA por la LERNANTOJ

Kontraŭ antaŭpago de UNU PESETO per poŝtmarkoj, ni sendas sortimenton da

DEK EKZEMPLEROJ de ESPERANTAJ  
GAZETOJ. (ne aktualaj)

ESPERANTO de U. E. A.

ESPERANTO TRIUMFONTA

KATOLIKA MONDO, k. t. p.

Mendoj: J. HERP

Carrer València, 245 - BARCELONA